

TIO ESTAS MI, NE TIMU (Mat 14,27)

Eŭkaristia medito de honorinda Conchita Armida

Jesuo, kiu ordonas al ventoj kaj ili obeas, eliras renkonten al tiuj, kiuj havas malgrandan kredon kaj estas timemaj, por doni al ili kuraĝon, por ke ili havu en Li grandan fidon.

Kuraĝon, ne timu, tio estas Mi, mi diris al miaj disĉiploj, kiuj el rigardo je mi ektimiĝis, kiam mi al ili dum sunleviĝo proksimiĝis kaj paŝis sur la maro. Per tiuj ĉi kuraĝigaj vortoj mi hodiaŭ en Eŭkaristio turnas min al vi.

Mi estas... Se vi havas min ĉe via flanko, kio vin timigus? Mi estas Dio de la paco, kiu sopiras vin savi, Dio de la pardono, kiu vin amas per senlima amo. Jam antaŭ aŭroro de ĉiuj tempoj mi vin amis, Mi estas Dio, kiu ne volas morton de la pekulo, sed ke li deturnu sin de sia konduto kaj vivu (1).

Mi estas Jesuo kaŝita en Eŭkaristio, mi estas tiu, kiu faras miraklojn de sia ĉiopotenceco, tiu, kiu estas ĉi tie kun sopiro, por enpreni en sian posedon tutan vian estaĵon.

Tial aŭdu per aŭdpovo de via animo la voĉon, kiu al vi diras: Ne timu, ĵetu vin en la maron de la doloroj senhezite, ĉar se vi havas kredon, mi mem estos via apogo.

Mi amas vin kaj iras al vi ĝuste tial, ĉar vi vane batalas kontraŭ ventego de viaj pasioj, se mi ne estas ĉe vi.

Mi estas tiu, kiu ordonas al la maro, silentigas la ŝtormojn same kiel mi silentigas ŝtormojn en la animoj de tiuj, kiuj alvenas, por min serĉi, kiuj plenaperte malfermas pordegojn, kiuj estas miaj.

Ne timu, ne timu, Mi estas aminda Jesuo.

Fidu kaj sentime ĵetu vin en brakumon de mia Patrino, sur tiun altaron, el kiu vin miaj okuloj serĉas en la homamaso. Venu, venu, tio estas Mi, tio estas Mi.

Danko

Mia bona Jesuo, kiel Petro mi eniras la akvon, por sentime iri al Vi, kiam mi aŭdas... Venu! (2). Tiel ankaŭ mi iras al Vi kun la sama entuziasmo kaj per ĉiuj fortoj de mia estaĵo kun certeco, ke mi ne dronos, se mi

havas la kredon.

Sinjoro, se tio estas Vi, ordonu min veni al Vi (3), kaptu min, se mi denove komencos droni en profunda maro de mia mizereco. Certe mi ne povas veni al Vi sen Vi, sed etendu vian manon kaj ekkaptu min, kiel Vi tion faris al Petro, fortigu mian kredon je via potenco kaj je via protekto.

Mia Jesuo, mi amas Vin kaj mi ne timas, ĉar Vi pardonas multon al tiu, kiu vin multe amas (4). Kreu en mi puran koron (5).

Vi estas mia forto. Konduku min, mia Jesuo, kaj larĝe malfermu mian estaĵon, por ke ĝi kapablu akcepti multobligon de Dia vivo.

Jesuo, multobligu mian kredon kaj donu, ke kresku ankaŭ mia kredo, kiu plifaciligas vojon de la Kruco, kiu la devon transformas je ĝojo, kio estas privilegio de Dia infanoj. Mi metas mian timon en vian mizerikordon, ĉar neniu, kiu fidas, estos damnita (6).

Patrino bonvolema, Vi scias, ke mi estas malforta kaj mem mi kapablas fari nenion. Tial Li venis kaj diris al mi, ke mi ne timu. Petu Lin, ke Li min benu, kaj helpu al mi, ke mi plenumu lian volon.

Ideo por la vivo

Mi konservos tiun ĉi belan principon: bone fari tion, kion mi faras, ĉar la hodiaŭa tago estas tio, kion Dio de mi postulas. Sentime antaŭ problemoj, kun pureco de la celo, volonte kaj ĝoje.

Antaŭintenco

Hodiaŭ Vi min vokas kaj mi ne timas, Jesuo; Vi diras al mi, ke tio estas Vi, kaj mi ne hezitos, spite de kiu ajn afflikto, en certeco, ke Vi estas kun mi.

Jesuo, mi dediĉas al Vi hodiaŭ ekzercon en iu virto por prospero de la Eklezio. ■

(1) kmp. Jeŝ 18,23

(2) kmp. Mat 14,29

(3) kmp. Mat 14,28

(4) kmp. Luk 7,47

(5) kmp. Psa 51,12

(6) kmp. Psa 25,2